



Boletín

Nº 349 *januaro/februaro 2001*



Homoj ore valoraj

Asociación de utilidad pública

FEDERACIÓN
ESPAÑOLA
DE ESPERANTO
HISPAHA - ESPERANTO - FEDERACIO

Boletín

BULTENO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO
Aperanta de 1949

Ĉefredaktoro: Miguel Gutiérrez
Adüriz; Los Coteros 1-C, 2-I; ES-39600
Muriedas; Cantabria; liven@nexo.es

*Noto: Pri la enhavo de la artikoloj
respondecas la respektivaj aŭtoroj. La
redaktisto rajtas rifuzi ne petitajn
artikolojn.*

Hispana Esperanto-Federacio


Rodríguez San Pedro 13, 3º, 7;
ES-28015 Madrid;
Tel.+faksilo: +34.(9)1.446.80.79
Konto ĉe BBVA (Caja Postal):
0182-2552-61-0204011.961
admin@esperanto-es.net
www.esperanto-es.net

Estraro

Prezidanto: Miguel A. Sancho.
Vicprezidanto: José M. Galofré.
Sekretario: Manuel Parra.
Kasisto: Pedro Garrote.
Vicsekretario: Marcos Cruz.
Voĉdonantoj:
Luis Hernández,
Augusto Casquero,
Miguel Gutiérrez.

Enhavo

Nia biblioteko (<i>Ana Manero</i>) . . . 2
1000 lernolibroj al Ameriko . . . 5
Fundación Esperanto. 6
Niaj Grupoj kaj Asocioj. 8
Kino (<i>Toño del Barrio</i>) 11
Grave (<i>M. A. Sancho</i>) 13
Kaj tiel plu (<i>M. Zocato</i>) 14
Ĉirkaŭ la mondo 15
Jen aperis 18
KAE en la Universitato (<i>José M. Galofré</i>) 19
Emas korespondi. 19
Reago (<i>Manuel Pancorbo</i>) . . . 20
Forpasis Alcibiades González. 22
Premio Klara Silbernik 2001 . 24
Olafo 25
Projekto Literaturo (<i>Miguel Gutiérrez</i>) 26
Recenzoj: Un siglo de Esperanto en Aragón (L. Noguero) 29
Franz Kafka (<i>J. Camacho</i>) . . . 28
Lingva Angulo (<i>A. Valén</i>) . . . 30
60a HEK, loĝado. 31
60a HEK, aliĝilo 32
Junaj lernantoj (<i>M.Z.</i>) k-d



Nia biblioteko

Jam delonge mi, kiel responsulo pri la Biblioteko “Juan Régulo Pérez”, ŝuldas ĉi artikolon al la redaktoro de Boletín.

Kvankam estas multo direnda, fakte mi ne scias, kiel komenci. Kiam antaŭ pli malpli dek jaroj ekis la renoviga laboro en la HEF-ejo, la tiamaj kunlaborantoj trovis amason da libroj stokitaj en la ŝrankoj de la oficejo.


Ekestis la ideo organizi per ili bibliotekon, el kiu la HEF-anoj povus iel profiti. Problemoj komenciĝis kiam oni klopodis realigi tiun planon, ĉar neniu el ni havis tiutempe ajnan scion pri la temo. Demandoj pri kiel ordigi la librojn, kiam ankoraŭ ne pretis la bretaro kaj sekve loko ne abundis; pri kian klasifik-sistemon uzi, por ke ĝi estu kohera; pri kiel glui la ident-etikedojn sur la plej malnovajn librojn, por ke la polvo ne tuj faligu ilin... Eĉ manipulado de kelkaj el la plej difektitaj kaj kadukaj iĝis problemo pro ilia emo dispeciĝi en niaj manoj, kaj pro la amaso da akaroj akumuliĝintaj en ties delonge ne malfermitaj paĝoj, kiuj nepre atakadis niajn esloremajn nazojn -imagi la ternokoncerton.

Eĉ se mi riskas forgesi iujn, pro kio mi anticipi senkulpigas min, mi ne povas ne menci kelkajn homojn kiuj siatempe kunlaboradis en la unua biblioteka skipo. Temas pri Maritza Graziani, Fernando Moral, Marcos Cruz kaj nia kara José M^a González Aboín, kiu pro malsanaj kialoj jam delonge ne plu aktivas, sed kiun ni, madridanoj, tute ne forgesas. Iom post iom mi surprenis la tutan respondecon, kiam aliaj ankaŭ farendaj taskoj reklamis la ceterajn kunteamanojn

La unuajn ŝancelajn paŝojn ni faris por informiĝi rilate al la teknikaĵoj. Tiel, konsiderinte la manko de spaco, ni pensis unue simple ordigi la librojn laŭ registro-numero, ĉar tiel ili aperas ordigitaj en la datumbazo.

Antaŭe “.org” nun “.net”

Ĉiam pli kaj pli kreskas la vizitoj al nia reŝidejo tiel ke, en la lastaj monatoj, duobliĝis la nombro de vizitoj al la retpaĝoj de HEF. Tamen, multajn problemojn devis superi lastatempe nia reŝidejo tiel ke la Estraro decidis ŝanĝi la antaŭan “org” per la nova “.net”. Notu bone do la novaj adresoj:



WWW.esperanto-es.net

admin@esperanto-es.net

info@esperanto-es.net

La solvo ne kontentigis nin ĉar la ordigo laŭtema ŝajnis pli kohera, kaj se iam estonte ni disponus pli da loko, la rezulto multe pli bonus kaj utilos. Tial ni decidiĝis por la Universala Decimalka Kodo, sed en versio simpligita, kiun mi vidis uzi en la lerneja biblioteko de mia tiama laborloko.

Intertempe, kaj dum la komputila datumbazo ankoraŭ ne estis preta, ni mankopiis surpaperen la libro-datumojn. Verdire, tiun taskon plurfoje ni devis refari, ĉar pro nescio, ni ne priatentis kelkajn datenojn, kiuj evidentiĝis iom post

iom necesaj. Poste, la tasko enkomputiligi la tuton. Nun, slipo de nia biblioteko donas sufiĉe da informoj pri la responda libro.

Surbrete, la libroj ordiĝas laŭ registro-numeroj pro manko da spaco, sed disponeblas laŭtema katalogo konsultebla por plifaciligi la serĉadon.

Kiel la biblioteko havigas al si la librojn? Nu, nia biblioteko konsistas ĉefe el donacoj. Eĉ se denove mi riskas ne menciigi ĉiujn menciindajn, mi citos tamen kelkajn.

Laŭ mia scio, Rafael Fiol kaj Carlos Martínez, el Seviljo, estis se ne la unuaj, certe el la plej fruaj donacintoj. Komence de la 70aj jaroj ili donacis al HEF tricent specimenojn. Anekdote, mi diru, ke tion mi nur sciis fine de 1998, kiam hazarde José María Rodríguez, el Kordovo, kaj mi

Kovrilo

S-anoj Antonio kaj Martí Guerrero organizis ekspozicion en *Centre Cultural Sant Josep* de L'Hospitalet.

ret-parolis pri la temo. Tiam li transdonis al mi la kompletan liston de iliaj donitaĵoj.

Kelkaj libro-kolektoj alvenis al ni post la forpaso de ties posedantoj, donacite de familianoj. Tiel, ĉe la bretoj kuŝas volumoj iam apartenantaj al Francisco Alafont, Mariano de la Iglesia aŭ Fabriciano Bermejo, i.a.

Eldonistoj ankaŭ kontribuas per sendado de ĵus eldonitaj libroj, ĉu rekte en la oficejon, ĉu pere de Miguel G.Adúriz, kiu ofte portas al la biblioteko ricevitaĵajn ekzemplerojn pro recenzo. Tiamaniere, ni disponas, ekzemple, la lastajn eldonaĵojn de UEA.

Kaj ne malgravas la kontribuo de verkistoj, donacantaj ekzempleron de siaj plej novaj libroj, tiel permesante al la biblioteko renoviĝi per la alveno de freŝaj verkoj. Tian bonan kutimon havas i.a. Miguel Fernández, Jorge Camacho kaj Liven Dek.

En 1998, nia biblioteko ricevis la subvencion el la Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen, kiu certe riĉigis ĝian enhavon. Entute alvenis dekses volumoj je valoro de 500 guldenoj.

Nur tre malofte, HEF aĉetas mem ion por la biblioteko. Tiel estis, kiam aperis la KD-aro "Kolekto 2000", eldonita de Vinilkosmo.

Pri ciferoj rilate la konsiston de la biblioteko (je 2000 12 31), pli bone tabelforme:

Speco *Kvanto*

Libroj 1.514

Revuoj, (ne)kompletaj jarkolektoj 766

4—

Kasedoj	23
Kompaktaj diskoj	25
Vinilaj diskoj	24
Vidbendoj	10
Aliaĵoj ne facile klasifikeblaj	14
Entutaj specimenoj	2.376

Restas ankoraŭ, kiel farendaĵoj la registrado de pluraj malnovaj revuoj, la ordigado kaj klasifikado de la fotostoko, la sistema arĥivado de ĵurnalaj eltondaĵoj, kaj la selektado kaj ordigado de multnombraj broŝuroj. Krom, kompreneble, plu havi la bibliotekon ĝisdatigita, kaj plu cerbumadi pri kiel maksimume profiti la malmultan spacon disponeblan en la HEF-ejo.

En la reta HEF-paĝaro eblas konsulti la bibliotekan datumbazon, tamen ankoraŭ ne aktualigita. Tio venos baldaŭ.

Por ke la biblioteko ne restu senutila, ĝi estas libere alirebla de ĉiuj. Tio signifas, ke kiu ajn povas konsulti ĝin surloke, kaj tiel ni sciigas al informpetantoj, kaj tiel ni informis al "Biblioteca Nacional" plenigante la demandaron por la aktualigo de ĝia katalogo pri bibliotekoj. Sed hefanoj havas ankaŭ pruntorajton. Mi ja tre bedaŭras, ke tiun rajton povis ĝis nun efektiviĝi nur madridanoj, sed kion fari? La biblioteko troviĝas fizike en Madrido, kaj mi timas, ke pluraj libroj perdiĝos se ni ekfunkciigus ian perpoŝtan pruntsistemon. Tamen indus priesplori la aferon. Mi dankus sugestojn ĉi rilate.

La evoluo de pruntkvanto estas sufiĉe kontentiga eĉ se nur madride, kaj konsiderante la ĝeneralan, ni diru, "neemon" al literaturo en esperantaj

HEF-Bulteno n-ro 349

1000 lernolibroj al Ameriko



Ene de la kampanjo “1000 lernolibroj al Ameriko” (vidu Boletín 342), HEF jam sukcesis sendi 200 ekzemplerojn al Venezuela Esperanto-Asocio.

Tre bela peripetio estis ja la maniero kiel oni sukcesis venigi la librojn en la manojn de niaj venezuelaj samideanoj. Ni konsciu ke 200 lernolibroj pezas 54 kilojn kaj okupas grandegan spacon, tial do la kosto de ĝia poŝta sendado estis tre alta. Feliĉe, samideano Manuel Pancorbo brave peris la sendadon tiel ke la libroj vojaĝis “aviadile” kaj “senpage”.

La unua sendaĵo el 100 volumoj iris la 11an de novembro kaj la dua iris la 7an de decembro. Kompreneble, la lernolibroj estas jam ĉe Venezuela E-Asocio, kiu kore dankis la iniciaton de la hispana movado.

Nun aliaj hispanamerikaj asocioj interesiĝas pri la oferto, tamen la favoraj kondiĉoj de sendado ŝajnas ne ripeteblaj. Ĉu ni kapablos venki denove la problemojn kaj sukcesos helpi la divolviĝon de la esperanto-movado en la hispanlingvaj landoj de Ameriko?

M. Zocato

rondoj. Endas diri, ke junuloj estas lastatempe oftaj uzantoj de la biblioteko.

Jen tabelo pri la kresko de pruntoj dum la lastaj jaroj:

Jaro	Nombro de pruntoj	Monata averaĝo
1996	14	1.16
1997	24	2.00
1998	50	4.10
1999	66	5.50
2000	118	9.80

Certe mankas informoj aŭ detaloj, sed ĉi artikolo jam tro longas. Nur afereto. Fojfoje kelkaj demandas pri la biblioteka nomo “Juan Régulo Pérez”. Tamen, pensu: kiu alia nomo estus pli taŭga kaj konvena al HEF-biblioteko?

Ana Manero



FUNDACIÓN ESPERANTO

Okazis kunveno de la Patronaro de la Fondaĵo Esperanto en Zaragozo por aljuĝi la diversajn premiojn kaj subvenciojn de la Programo 2000. Tiuj premiojn kaj subvenciojn oni diskonigis sur la pasinta numero de Boletín kaj ankaŭ pere de leteroj adresitaj al ĉiuj hispanaj E-grupoj. Post aŭskulti la sugestojn kaj proponojn de la patronoj oni decidis jene:

* Konkurso por premii la du plej bonajn eseojn pri modernigo de nialandaj E-societoj:

Oni ne aljuĝis la premiojn pro ne-prezento de eseoj.

* Subvencio pro partopreno en ferioj aŭ ekspozicioj:

La Fondaĵo Esperanto asignas 50.000 Ptojn al la Astura E-Asocio pro ĝia partopreno en la Ekspozicioj pri Lingvoj okazinta en la urbo Gijón en la monato marto de 2000. Same oni aljuĝas 25.000 Ptojn al la Esperantista Societo de Tenerife pro ĝia partopreno en la Libro-Foiro okazinta en la urbo La Laguna dum la monato aprilo de 2000.

* Subvencio pro la organizado de kurso en hispanaj universitatoj:

La Fondaĵo Esperanto asignas 50.000 Ptojn al la Kultura Esperantista Asocio de Sabadell por la Esperanto-kurso kiun ĝi efektivigis en la Aŭtonoma Universitato de Barcelono dum la lastaj monatoj de la jaro 2000.

* La Patronaro de la Fondaĵo ankaŭ decidis aljuĝi 50.000 Ptojn al la Aragona Esperanto-Centro Frateco de Zaragozo pro la eldono de la verko "Un siglo de Esperanto en Aragón".

* Pro manko da tempo kaj pro la fakto ke ankoraŭ oni devas konkretigi kelkajn aferojn oni decidis ne realigi dum la jaro 2000 stipendion por helpi hispanan studenton sekvi E-kurson en la Universitato Adam Miczkiewicz en Poznan (Pollando).

La Direktoro de la Fondaĵo Esperanto kontaktos kiel eble plej baldaŭ kun la subvencitaj Esperanto-Asocioj por havigi al ili la asignitajn mon-kvantojn.

Fine, oni aprobis ke la premioj kaj la subvencioj ne aljuĝitaj dum la jaro 2000 sumiĝos al la fondusoj aprobotaj por la jaro 2001.

Zaragozo, la 31an de decembro 2000.

HEF-Bulteno n-ro 349

Fundación Esperanto

Agad-plano kaj buĝeto por la jaro 2001

La 31an de januaro 2001 denove kunvenis la Patronaro de la Fondaĵo Esperanto por aprobi la agadplanon kaj pretigi la buĝeton por la jaro 2001.

Oni aprobis la jenan programon de subvencioj, kiel eble plej baldaŭ oni konkretigos la regularojn:

* Fonduso por helpi la hispanajn E-grupojn kiuj prezentos standojn en forioj kaj ekspozicioj por propagandi Esperanton dum la jaro 2001: 100.000 Ptoj.


* Fonduso asignota al la eldonantoj de libroj en Hispanio en aŭ pri Esperanto dum la jaro 2001: 100.000 Ptoj.

* Fonduso por helpi la E-grupojn kiuj organizos kaj efektigos Esperanto-kursojn en hispanaj universitatoj dum la jaro 2001: 200.000 Ptoj.

* Stipendio por sekvi studojn pri Esperantologio kaj Interlingvistiko en la Universitato de Poznan (Pollando): 150.000 Ptoj.

La buĝeton oni kompletigas per 50.000 ptoj por la diversaj administraj elspezoj de la Fondaĵo.

HEF-Bulteno n-ro 349



Atentu!

Por subteni la agadon de Fundación Esperanto sendu vian kontribuon al:

IberCaja, kontonumero:

2085-0101-13-286247-62

aŭ al la kontonumero ĉe La Caixa:

2100-2149-31-0100165085.


Ni atentigas al eblaj interesatoj ke, nur rajtos ricevi subvenciojn tiuj kiuj efektigos la programerojn dum la jaro 2001 kaj ke la limdato por la peto de ĉi-subvencioj finiĝas la 15an de decembro 2001, ĉiuj agadoj devos esti akompanataj de la koncernaj atestiloj, kiuj certigos la okazigon de la agadoj.

Venont-numere en Boletín kaj pere de leteroj adresotaj al la hispanaj E-grupoj ni konkretigos la regularojn de la diversaj fondusoj. Kompreneble, se vi tion deziras vi povas peti pliajn informojn al: Fundación Esperanto; C/ de la Cadena 20-22 1 izda; E-50001 Zaragoza; aŭ al: José María Rodríguez Hernández; Apartado 3142; E-14080 Córdoba.

Jose Maria Rodriguez Hernandez

Patrono-Direktoro

—7



Niaj Grupoj kaj Asocioj

Andaluzio

* Post longa paŭzo (ek de aŭgusto), ĉe la retsidejo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo (sekcio Radio) denove aŭskulteblas la lasta programo "Trarigardo de Esperanto-Gazetaro", de Radio Polonia. La programoj elsenditaj inter aŭgusto kaj decembro aperos iom post iom.

Jose F. Martín

* La 15an de decembro okazis en Malago Eksterordinara Ĝenerala

Kunsido de AEU kun la celo elekti Estraron. Oni decidis renomumi la ĝisnunajn estraranojn: Prezidanto: Andrés Martín González (Malago); Vic-Prezidanto: José Francisco Martín del Pozo (Malago); Sekretario: Jesús García Martínez (Malago); Kasisto: Julio Herrero Segura (Malago); Voĉdonantoj: pri rilatoj kun blinduloj: Alejandro Iglesias Campos (Tarifo, Kadizo); pri propagando: José María Rodríguez Hernández (Kordovo)

* La 17an de decembro finiĝis la elementa E-kurso organizata en Kordovo de la Fondajo Sin Barreras de Comunicación kaj AEU. La kurso

komenciĝis en oktobro kaj ĝi okazis en la publika lernejo Ciudad Jardín, kies direktorino afable pruntedonis klasĉambron. Finis la kurson sukcese 14 gelnantoj, inter ili profesoro de la Kordova Universitato, lernejoj instruistoj kaj lernantoj de la Filologia Fakultato. Post la 30 horoj de la kurso la gelnantoj atingis elementan nivelon por ekkonversacii en Esperanto kaj por legi kaj kompreni la artikolojn de la E-gazetaro.

José María Rodríguez


Aragono

* la 15an de decembro S-ro Lorenzo Noguero prezentis la verkon "un siglo de Esperanto en Aragón" kiel unuan parton de la zamenhofa festo (librotago) en la sidejo de Frateco. Poste. Poste... manĝetoj kaj trinkaĵoj.

La 16an okazis frateca tagmanĝo.

* Elementan kurson gvidas s-ro Lorenzo Noguero kaj praktikan kurson gvidas s-ro Antonio Marco, kiu nuntempe vizitas Interretan-kurson por ne maltrafi la

HEF-Bulteno n-ro 349



Antonio Marco ĉe la enirejo de la nova sidejo de Frateco kaj Fundación Esperanto

novajn teknologiojn aplikatajn al niaj asocioj.

M. Zocato

Asturio

* Dimanĉe, la 17an de decembro, la geesperantistoj de Asturio festis la Zamenhofan tagon. Tiu astura geesperantistaro konsistas ĉefe el la membraro de du E-societoj: la Grupo *Antaŭen*, de Avilés, kaj *Astura Esperanto Asocio* de Gijón. Ĉiujare, la festo estas organizata en unu el tiuj urboj; ĉi-jare estis la vico de Gijón. Kiel kutime, la geesperantistoj koncentriĝis en la strato HEF-Bulteno n-ro 349



Florbukedo ĉe la tabulo

«Esperanto», kie oni faris etan omaĝon al nia Internacia Lingvo per surmetado de florbukedo apud la tabulo de la stratnomo (vidu la fotojn de tiu akto, faritajn de la prezidanto de Astura E-Asocio, Santiago Mulas).

Poste, en proksima restoracio okazis bankedo en agrabla kaj amikeca etoso. Ĉeestis preskaŭ la tuta membraro de la du



Komuna foto en la strato Esperanto

E-grupoj, sed tiu fakto povas false impresi pri la situacio de la grupoj rilate al ĝia agado, ekzemple, ne granda partopreno en la organizataj kursoj. Tial do la celebrado de nia ĉiujara festo estu konvena okazo por ekzameni nian strategian aliron al la socio. Hodiaŭ ni devas konstati ke la tradiciaj metodoj, ne plu utilas en ŝangiĝanta socio, en kiu ĉiaj organizaĵoj feblas pro la manko de partopreno de la publiko en la aktivado kaj en la taskoj de tiaj societoj. Oni devas elpensi novajn formulojn de aliro al la publiko, eble pere de Interreto kaj la elektronika poŝto. Indas prikonsideri tion.


Faustino Castaño

* Aperis la 25a numero de Antaŭen, bulteno de la E-grupo de Avilés, kies aperon elstare prikomentas la loka ĵurnalo *La voz de Avilés*.

M. Zocato

Ekstremaduro

* En la mezlernejo Cuatro Caminos de Don Benito okazas kurso por komencantoj aldone al la regula instruado. Ĉi jare, gvidataj de prof. José M. Salguero, sep gelemnantoj 17—18-jaraj ĝuas la



10—

Sopena

* Editorial Sopena informis pri la “denova” elĉerpiĝo de la vortaro Lexicón. Tamen, HEF posedas ankoraŭ kelkajn, tre, tre malmultajn ekzemplerojn, kiuj verŝajne tre rapide elĉerpiĝos.

* En sia januara labor-kunsido, la HEF-estraro decidis i.a. donaci dek ekzemplerojn de la poŝvortaro Lexicón Sopena al Gvatemala Esperanto-Asocio. HEF pagos ankaŭ la sendokoston.

lecionojn. Salutojn oni povas sendi al: IES Cuatro Caminos (Grupo Esperanto); Torre Isunza; 06400 Don Benito; Badazoz. La gelemnantoj emas korespondi!

Eŭskio

* Kiel anoncite, la 16an de decembro ni celebris la zamenhofan naskiĝdatrevenon ĉe nia grupejo, kun la ĉeesto de 20 geesperantistoj. Post spektado de videofilmo enhavanta intervjuon, faritan de la televidkanalo “Bilbovisión” al niaj samideanoj Eduardo Larrouy kaj Jesús M. García, okazis vigla diskuto pri la presentado de Esperanto ĉe la amaskomunikiloj. Bondeziraj vortoj de nia prezidantino, Igone Manciles,

HEF-Bulteno n-ro 349

malfermis la vojon al alia pli vigla interparolado ĉirkaŭ tablo plenplena de la manĝaĵoj kaj trinkaĵoj alportitaj de la ĉeestantoj.

* La 31an de decembro 2000 nia E-Grupo nombris 76 membrojn. Tamen,

Kino

Legante libron pri “Historio de la hispana kino”, redaktita kaj kunordigita de Román Gubern (Ediciones Cátedra, 1995), mi trovis etan mencion pri filmo de la jaro 1934, farita de Delmiro de Caralt kaj titolita “Memmortigo” (tiele!). Ĝi ne estas traduko el la hispana aŭ kataluna.

Mi serĉis en la Reto kaj trovis etan mencion pri la sama filmo, kaj kelkajn aludojn al Delmiro (aŭ Delmir) de Caralt, kiu estis unu el la ĉefaj fruaj kolektantoj de kinajoj, kaj kiu donas (aŭ donis) sian nomon al la biblioteko de la Filmokolekto de la kataluna registaro (Filmoteca de la Generalitat). Bedaŭrinde, mi ne trovis detalojn pri la ebla esperantisteco de la filmo.

Cetere, mi ne trovis informojn pri hispanaj filmoj rilataj al Esperanto en la artikoloj pri historio de la kino kaj Esperanto de David Poulson, kiun oni povas legi ĉe “www.suite101.com”

Nu, ĉu iu konas pliajn detalojn?


Toño del Barrio

iom post iom, daŭre malkreskas tiu nombro, ĉar dum la lastaj jaroj ne alvenis novaj gelemnantoj al niaj kursoj.

* Malgraŭ ke en la listoj disvenditaj la saman tagon, tuj post la lotado, la numero ludata de nia Asocio en la kristnaska nacia loterio aperis kiel premiita, verŝajne okazis eraro, ĉar en la oficiala listo ĝi estis forviŝita. Nu, tial ke tiu ĉi lasta estas la sola kiu validas, la unuaj onidiroj neniĝis kaj, denove, Fortuno ne trafis nin. Korajn dankojn al ĉiuj, kiuj helpis nin per aĉetado kaj disvendado de la kvitancoj kaj... ĝis la venonta jaro.

J. M. García Iturrioz

Galegio



La ĵurnalo “La Opinión”, nova, altkvalita ĵurnalo de La Coruña, intervjuis s-ron Antonio Alonso Núñez, antaŭa Prezidanto de HEF en lia hejmo. Poste, sekve de la artikolo, la radioentreno COPE intervjuis lin denove dum kelkaj minutoj.

La afero estas, kompreneble, nur plia ŝtupo en la informado rilate al nia lingvo; tamen, oni devas reliefigi la objektivan

prezenton de la ĵurnalisto kaj la tre oportunan foton kiu kompletigis la artikolon.

M. Zocato

Kantabrio

* Dum januaro kaj februaro okazas ĉiumarde du 8-horaj kursoj gvidataj de Miguel Gutiérrez en Luey, vilaĝo situanta proksime de la okcidenta landlimo de Kantabrio. La unuan kurson partoprenas 7 infanoj kaj la duan 8 plenkreskuloj. La kostojn de la kursoj pagas la vilaĝa komunumo.

* ĉi jare ACE ne celebris la Zamenhof-tagon, post la neatendita morto de Lucia Peredo, vere simpatia kaj fervora membro de la asocio, kiu partoprenis ĉiujn naciajn kaj internaciajn E-aranĝojn. Ŝian mankon ni forte sentas.

* La 14an de decembro aperis en la angulo *Leteroj de la leganto* de la ĵurnalo *Alerta letero* de maljuna esperantisto, s-ro Urano Macho, titolita "A propósito del Esperanto".

Laro Diez

Katalunio

* Barcelona Esperanto-Centro informas ke ĝi ne plu sidas ĉe

strato Carreras Candi. De nun ĝia sola valida adreso estas: Apartado 23484, 08080 Barcelona. La asocio festis la

12—



Giordano vizitis la sidejon de BEC

zamenhofan tagon (librotago) la 20an de decembro en sia sidejo. S-ino Vimala Devi, edzino de nia elstara verkisto Manuel de Seabra, prezentis sian novelaron "Musono".

* En oktobro okazis E-Ekspozicio en Centre Cultural Sant Josep de L'Hospitalet, organizita de Antonio kaj Martí Guerrero.

* Ankaŭ en oktobro s-ro Giordano Moya kaj lia edzino Lola vizitis la superan kurson de BEC. Ili ekkonis la kunlaborantojn de la traduka fako kaj tralegis la unuajn tradukitajn ĉapitrojn.

* E-Babiladoj: la 21an de januaro en la kulturdomo de Sant Cugat del Valles, temo: "2001, jaro de la lingvoj en Eŭropo", kaj la 18an de februaro en la kulturdomo "Conex" de Premiá de Mar, temo: "la jarcenta bilanco".

* KAE daŭre serĉas pagotan oficiston.

* KAE havos sian Ĝeneralan Kunsidon la 30an de januaro en Sabadell. Okazos parta renovigo de la Estraro.

M. Zocato

* La ĵurnalo "El Mercat de l'Hospitalet" (2000.10.25/31) intervjuis Samideanon Martí Guerrero.

HEF-Bulteno n-ro 349

Grave!

La kongresanoj de la 60a Hispana E-Kongreso devos elekti la Estraron de Hispana E-Federacio por la venontaj kvar jaroj. Tial, pere de ĉi komunikaĵo, oni invitas la membrojn prezenti siajn eventualajn proponojn de kandidatiĝo al la Sekretario de la Asocio.

Miguel Ángel Sancho, Prezidanto

“Aquí-Semanari de L’Hospitalet et Baix Llobregat” (2000-11-3/9) anoncas la senpagan kurson de esperanto en la Kultura Centro Sant Josep. Ankaŭ la kurso organizita de la Grupo de Esperanto de Horta (Barcelona-kvartalo) estis anoncita kiel vintra aktivaĵo en la programo de la Kultura Centro “Matas i Ramnus”.

Nia voĉo

* Aperis raporteto en “Diari de Sabadell” (00.12.08) pri la fermo de la e-kurso en la universitato kun grupa foto de la lernantaro.

J.M. Galofré

Madrido

* Post la Ĝenerala Kunveno de MEL (01.01.29), la Estraro por la periodo 2001-2004 estas jena: Prezidantino: HEF-Bulteno n-ro 349

Carmen Suárez Fernández-Cid;
Sekretariino: Guadalupe Sanz Bueno;
Kasisto: José Franciso Platas;
Voĉdonantoj: Juan A: del Castillo
Martónez kaj Angelita Sanz Mayor

* La Zamenhofan feston oni celebris ĉi jare la 27an de januaro. Partoprenis ĝin 34 personoj. Lucrecia San Antonio, 89-jara, faris kaj deklamis poemon.

* Daŭras la kursoj en Distrito Argüelles (HEF-sidejo), Distrito Arganzuela (Hogar del pensionista “Puente de Toledo”) kaj Universidad Autónoma de Madrid.

Valencio

La Kongreso de Valencia E-Federacio kaj Murcia okazos la 12an kaj 13an de majo 2001 en Alicante. Kontakt-adresoj: rete: a.casquero@eresmas.net; Poŝte: Valencia Esperanto-Federacio. Avenida Peris y Valero 96, 5a; 46008 Valencia.

Tutlande

* La jam konata raporto de Iker Merchán, aperinta en la centraj paĝoj de “El Correo” de Eŭskio kaj “El Norte de Castilla” de Valladolid, aperis ankaŭ en la ĵurnalo “El diario Montañes”, plej vendata gazeto en Kantabrio, kaj en la ĵurnalo “Hoy” de Badajoz (00.11.11). Unu semajnon poste aperis tre bona reaga

letero de José M. Salguero en ĉi lasta ĵurnalo.

M. Parra

* “El Mundo” ĝemeligis esperanton kun suahila lingvo. Tio okazis en la raporto pri la salutoj de Papo Johano Paulo la 2a okaze de la Kristnaska Meso

* Samideano Toño del Barrio partoprenis tre sukcese en la konkurso de Tele5 ¿Quiere ser millonario? (Ĉu vi volas esti milionulo?). Li deklaris sian esperantistecon antaŭ la telespektantaro kaj, en la konkurso, li gajnis 3 milionojn da pesetoj. Brave!

Dario Rodríguez


* La revuo “Perfiles”, eldonita de ONCE, denove (decembro-2000) anoncas la E-kurson proponatan de Andaluzia Esperanto Unuiĝo en sia retsidejo.

Nia voĉo

* Jon Urresti (Radio Euskadi) intervjuis s-anon Marcos Cruz por la programo “La montaña mágica” (La magia monto) la 16an de decembro 2000, je senpera elsendo. La 20-minuta intervjuo okazis tre glate, kaj la intervjuanto montris favoran sintenon. Li demandis pri: rilato inter Esperanto kaj Internet; la akcepto de Esperanto en la tri ĉefaj komputilaj mastrumsistemoj (DOS/Windows, MacOS kaj Linux); Virtuala Esperanto-Biblioteko kaj aliaj rimedoj en la reto; utiligo de Esperanto; Pasporta Servo; antaŭjuĝoj pri Esperanto; rolo de la angla kompare al Esperanto; protekto de minoritataj lingvoj; kaj aliaj temoj.

Marcos Cruz

14—



Kaj Tiel Plu

Aperis tre interesa disko de la kataluna muzik-ensemblo “Kaj Tiel Plu”. Flutoj, klarneto, mandolino, violonoj, violonĉelo, gitaro kaj perkutiloj akompanas la voĉojn. Mezepokaj kantoj, katalunaj, okcitanaj, kastiliaj aŭ sefardaj, eĉ judkatalunaj, estas prezentitaj foje en la origina lingvo, foje en Esperanto.

La grupo, fondita en 1986 fare de Xavier Rodon kaj Pep Tordera nun konsistas el naŭ membroj, kiuj laste prezentis sin en Montpellier (1998) okaze de la UK, en Manresa en novembro 1999 okaze de la 1a Transpirena Kongreso kaj en Tuluzo ĉe la Kultura Arta Festivalo de Esperanto en julio 2000. Ĉi-jare la grupo registris sian unuan k-diskon “Sojle de la klara tempo” ĉe Vinilkosmo.

Ne maltrafu ĝin!

M. Zocato

HEF-Bulteno n-ro 349



Ĉirkaŭ la mondo

Datoj

* La IJK (Internacia Junulara Kongreso) 2001 okazos en Strasburgo (Francio) de la 29a de julio ĝis la 5a de aŭgusto.

* La 17a Printempa Semajno Internacia (ĉefe por E-familioj) okazos en St. Andreasberg (Germanio) de la 9a ĝis la 16a de aprilo. Temo: Eŭropo sen lingvaj limoj?

Zamenhof: Podlahi-ano de 20a Jarcento

Antaŭ kelkaj monatoj ni informis pri la plebiscito kiun organizis Gazeta Wyborcza lige al elekto de "Bialistokano de 20a Jarcento" en kiu venkis iniciatinto de Esperanto Ludoviko Zamenhof.

Nun ni estis informitaj pri la nova plebiscito kiun organizis alia gazeto "Gazeta Wspolczesna" (Novtempa Gazeto). Ĝi daŭris preskaŭ unu jaron kaj estis ligita kun la elekto de la plej populara kaj ŝatata persono kiu vivis en la regiono HEF-Bulteno n-ro 349

de Podlahio en 20a jarcento. Oni proponis elekti la personon kiu danke al sia laboro estas plej konata inter la popolo de la regiono. Kun granda ĝojo redakcio informis nin, ke en la plebiscito venkis Ludoviko Zamenhof.

Pri tio oni informis en la gazeto la 10an de novembro kaj la solena anonco de la rezultoj okazis la 15an de decembro en "Podlahia Muzeo" en Bialistoko.

La redakcio invitis multajn gastojn, ĵurnalistojn el la radio kaj televido, kaj ankaŭ reprezentantojn de Pola Esperanto Asocio.

Stanislaw Mandrak (ret-info)

Sankta Nikolao

1an, 2an kaj 3an de decembro, kaj organizita kiel ĉiujare de Esperanto Regiona-Societo de Poprad (Slovakio), laŭ la gvido de ties Prezidanto S-ro Milan Zvara, okazis en ĉi tiu belega pola vilaĝo, la "Internacia Festo de Sankta Nikolao".

Partoprenis ĉirkaŭ 30 homoj, el 4 landoj (Slovakio, Pollando, Britio kaj Hispanio).

Sabate vespere, la 2=AA de decembro, alvenis Sankta Nikolao, tre bele ekipita kun la tradicia episkopa vestaĵo,



Sankta Nikolao (kies voĉo tre similis al tiu de s-ano Milan Zvara), kun helpanta anĝelino, kaj samideanoj el Pollando kaj Hispanio.

bastonego, mitro kaj longa blanka barbo, kaj disdonis amason da donacoj al la ĉeestantoj, kiuj, speciale la infanaro, ege ĝojis pro tio.

Estas interese klarigi ke, kiel vera miraklo, ĉar en la tempo kiam vivis Sankta Nikolao ankoraŭ ne ekzistis tiajn lernolibrojn, li tre flue parolis esperante.

Etoso estis egre agrabla, loko belega (ĉirkaŭata de la belaj Tatraj Montoj), Pere de Esperanto ĉiuj babiladis kaj amikiĝis dum tiuj belaj kaj neforgeseblaj tagoj, kaj sin adiaŭis, esperante denove renkontiĝi okaze de Sankta Nikolao-a Festo.

Augusto Casquero

Grava laboro

Trovanto, ret-katalogo de Internacia Esperanto-Muzeo, kreskis ĝis 12.000 rikordoj (datumaroj), kun kelkaj novaj kaj multaj malnovaj, malofte troveblaj libroj. Kaj ĝi daŭre kreskas!

La retrospektiva prilaboro rapide antaŭeniras kaj Trovanto proksimiĝas

ĉiam pli al la alstrebita idealo de plena katalogo de Esperanto kaj interlikngvistiko. Uzu la datumbankon.

Helga Farukuoye

<http://euler.onb.ac.at/cgi-allegro/mask.e.pl?db=esperanto>

Unua lernolibro

La unuan lernolibron por udmurtoj, aŭtoktonaj loĝantoj de Udmurtio (Ruslando), aperis en decembro 2000 eldonita de "Ruslanda Esperantisto" (Jekaterinburg, Ruslando), danke al subvencio de FAME-Fondaĵo (Germanio). Ĝi estas 80-paĝa kaj enhavas 20 lecionojn.

La 200a

Fine de decembro aperis la jubilea, 200a numero de la plej ofta internacia E-gazeto Eventoj. Pli ol 1600 paĝoj A-4, ĉ. 1 milionoj da literoj, pluraj miloj de publikutilaj kaj interesaj artikoloj — en nur 8,5 jaroj...

Post ĝia lanĉo en 1992, Eventoj iĝis populara gazeto kies simpla redaktejo kreskis al E-a servocentro, kiu nun laboras pri: Plena Kalendaro de ĉiuj E-aranĝoj. Informinterŝanĝejo por redaktoroj de E-gazetoj: "Interredaktore". Eldonejo de E-raraĵoj, sonmaterialoj, reklamiloj. Funkciigo de filtrata E-novaĵservo: Ret-Info. Kompilado de publikutilaj adresaroj (gazetaro, retlistoj, videofilmoj)...

HEF-Bulteno n-ro 349



La familio Maynou-Gómez sprite propagandas favore al Esperanto en Interreto. Ili prezentas la historion de sia hanstero, kiu ricevis la nomon "Esperanto" pro sia emo ekskursi sur esperanto-libroj. Vidu ĉi supre kelkajn fotojn de nia "samideano".

Paroli...

Preskaŭ nekredible, sed pli ol 150 Esperanto-lingvaj retlistoj ekzistas jam!

Tiuj diskut- kaj dissendo-listoj staras je ĉies dispono. Fakte, oni bezonas nur retpoŝtan konekton por ilin uzi kaj ĝui debatante kun homoj de la tuta mondo.

Kompleta listo troveblas en speciala kromnumero de Eventoj (dec. n-ro 197) kaj daŭre aktualigata versio aperas ĉe <http://www.eventoj.hu>

L. Szilvasi

Instruado

En la ekonomik-konstruista altlernejo de Ivanovo (Rusio) oni amase instruas Esperanton al la studentoj. La pli aĝaj el ili studas ĝin devige (!) kaj la unuajaruloj rajtas propravole ekstudi en E-kursoj. En la altlernejo funkcias 30-persona E-klubo.

Instruas du salajrataj instruistinoj, Nataŝa Anisimova kaj Nataŝa Nazariĉeva. La enkoduko de la lingvo en la programon de la altlernejo okazis danke al tre favora sinteno de ties direktoro.

HEF-Bulteno n-ro 349

Netscape 6

Plej lasta versio de la konata retumilo Netscape, la sesa (ankaŭ konata kiel Mozilla/5), prezentas sin kiel programo plene esperantokapabla. La uzanto povas elekti inter latin-3 kaj la pli modernan unikodon.

Netscape kreis la novan programon kun la helpo de centoj da volontuloj el la tuta mondo.

Dario Rodriguez


UEA

D-ro Hans Michael Maitzen, reprezentanto de UEA, kiu kungvidas packomitaton de NRO-j en Vieno, estis reelektita por dujara periodo kiel sekretario de la Packomitato de Ne-Registaraj Organizaĵoj reprezentataj ĉe la sidejo de Unuiĝintaj Nacioj en Vieno. En la Packomitato membras 22 Ne-Registaraj Organizaĵoj.

Gratulon al UEA kaj al la reelektito!

M. Zocato

—17



Jen aperis

Jen la listo de libroj ricevitaj jen pere de privata donaco, jen senditaj de la respektivaj eldonejoj. Ili apartenas jam al la Biblioteko Juan Régulo.

* **Esperanto subgrunde** (k-disko) Vinilkosmo. Vinilkosmo 2000. Brazilo.

* **Santa Cruz de la Palma y el Esperanto** Trujillo Casañas, Leandro. Sociedad esperantista de Tenerife 2000. Hispanio.

* **Necesidad histórica y valor literario del esperanto** Régulo Pérez, Juan. Sociedad esperantista de Tenerife 1999. Hispanio

* **Almanako Lorenz 1985** Salvador kaj aliaj, Carlos Bernardo. Spirita Eldona Societo F.V.Lorenz 1985. Brazilo.

* **Mond-sav-plano.** Cool, Gerard. Belloprint 2000. bg. La aŭtoro. Fundamento de la tutmonda movado de verd-verdaj paĉuloj.

Donacitaj de Leopoldo Fernández:

* **Perloj de l'saĝoj** Bahá'u'lláh. Eld. Bahaa Esperanto-Ligo.

* **Bahá'u'lláh.** Eld. Bahaa Esperanto-Ligo

Donacis Miguel Fernández:

* **Somero Cigana** Venelin Mitev.

* **Kantoj de motoroj** Nikola Vapcarov.

Donacita de David Galadí

* **Elementa kurso pri astronomio** D. Galadí, A. Wandel. Kajero.

Donacitaj de Francisco Alafont

* **Bill kaj Lazuraj Okuloj** Goldoni, a. kaj Gabrielli, L. Ĉe la verkintoj 1964. Italio.

* **Bulgario** Balabanov, Bojan. Eldonejo de Literaturo en Fremdaj Lingvoj 1959. Bulgario.

* **La timo** Danov, P. Biblioteko Nova Kulturo 1931. Bulgario.

* **Tartarin de Taraskono** Daudet, Alphonse. Heroldo de esperanto 1955.

* **Jarlibro (1a parto) 1961** UEA. Universala Esperanto Asocio 1961. Nederlando.

* **Jarlibro (1a parto) 1969** UEA. Universala Esperanto Asocio 1969. Nederlando.

Donacitaj de Germana Esperanto-Junularo:

* **La aventuroj de Villi Abeló.** Libreto uzita en la 33a Internacia Infana Kongreso.

Donacis Venancio Monsalve

* **Enciklopedio de Esperanto.** Volumoj I kaj II. Literatura Mondo. Budapeŝto 1933-34.

* **Originala verkaro.** L.L. Zamenhof. Ferdinand Hirt & Sohn en Leipzig, 1929. Esperanto fako.

Ana Manero

HEF-Bulteno n-ro 349

KAE en la Universitato

Instruado de Esperanto unufoje en kataluna universitato, jen la defio kuraĝe akceptita de KAE en 1999. Oficiala trimonata kurso kun tri-kredita valoro en la Aŭtonoma Universitato de Barcelono estis la unua pozitiva paŝo.

En la jaro 2000, post la koncernaj demarŝoj ĉe la Direktoro de la Universitato kaj grandnombra disdonado de informoj pri Esperanto, ofte kun rektaj personaj klarigoj al gestudentoj, Kultura Asocio Esperantista refoje funkciigis oficilan kurson en la sama universitato. Ĉeestis 26 lernantoj, kiuj ek de la 19a de oktobro lernadis kun kreskanta intereso sub la gvido de la instruisto s-ro Martí Guerrero i Cots.

KAE estas kontenta pro la ĝisnunaj rezultoj de sia esperiga strebado en la universitata medio al kiu ankaŭ helpis la iniciato kaj monofera stimulo de Fundación Esperanto kaj HEF.

Ni povas do reciproke nin gratuli!

*José M. Galofré (KAE-Prezidanto,
HEF-Vicprezidanto)*

(Vidu foton sur la kovrildorso)

HEF-Bulteno n-ro 349



Emas korespondi

* Mi ŝatus korespondi pri religioj, fremdlingvoj, vegetarismo, vojaĝoj kaj socia vivo en diversaj landoj. Mi estas kanadano kaj aĝas 67 jarojn. Mia adreso: T. James Brennan; 23 Kathrose Drive; Willowdale, Ontario; Canada M2J 3P4.

* Pri diversaj temoj ŝatus korespondi s-ro Tonev Tonjo Lozev; 6000 Stara Zagora; str. G. Papazĉev 8; p.obŝtejtite, et 8, ap 80; Bulgario.

* 36 jaraĝulo deziras trovi leteramikojn en Hispanio. Adreso: Mirka Ascherova, Josefodolska 12, CZ-293 07 Mlada Boleslav-Debr, Ĉeĥio.

* Esperanto-gelernantoj 13-16 jaraĝaj deziras korespondi kun gesamideanoj el la tuta mondo pri ĉiuj eblaj kaj interesaj temoj. La aĝo ne gravas. Eĉ grupoj povas aliĝi. Adreso: Valerij Malihin, infana Esperanto-klubo, Dvorec pionerov, str. Konstitucii 1, 660049, Krasnojarsk, Siberio, Rusio.

Ret: sapphire@ns.kgtu.runnet.ru.

—19

Reago

En la numero 348 de “Boletín”, S-ro Serrano skribis kelkajn komentojn pri la organizado kaj organizintoj de la 59a Hispana Kongreso. Ni sentas nin aluditaj, kiel anoj de la organiza skipo do ni reagis sekve. Unue ni klarigu al tiuj kiuj ne ĉeestis la Kongreson, ke preskaŭ ĉiujn plendojn ni jam respondis dum la programero “Kritika Rondo” fine de la Kongreso, sed S-ro Serrano ne aludis tiujn respondojn en sia letero, krom interveno de la Prezidanto mispaperigita de li.

S-ro Serrano skribis:

“Mi devas unue diri ke la ordo-numero de la kongreso ne estis anoncita, almenaŭ en la Kongresa libro”

Tio ja estas miso kiun ni, organizintoj, agnoskas. Tamen, en la ret-paĝoj, en la anoncaj bultenoj kaj “Boletín”-paĝoj estis bone videbla la numero “59”.

S-ro Serrano skribis:

“Kial oni rompis la tradician kutimon starigi flagon? Certe mi ne povas konkrete respondi. Ĉe diversaj protestoj, nia HEF-Prezidanto aludis al la fakto ke ne plu estas uzataj flagoj en la multaj diversaj organizaĵoj, ke tio malnoviĝis, kadukis. Terura misprezento de la realo.” (Sekvas ekzemploj de uzo de simboloj en la moderna vivo)

Tio vere terura estas la misprezento kiun S-ro Serrano faras de la vortoj de nia 20—

Prezidanto. S-ro Sancho diris ke «*tiaj*» simboloj, kia nia flago, eksmodas nun, aludante ĝian aspekton 19-jarcentecan. Komprenible, —S-ro Sancho daŭrigis— simboloj grave rolas en la moderna vivo, sed en formo tute kongrua kun la tempo kiun tiuj simboloj reprezentas. Ĉiuj ekzemploj (krom esceptoj) prezentitaj de S-ro Serrano estas simboloj daŭre evoluantaj dum periodo eĉ malpli granda ol 114 jaroj, kiu estas la aĝo de nia lingvo.

Kial, do, rompi la tradicion starigi tiun flagegon? Ĉar ni pensis ke ni ne plu vivas en epoko kiam tiu flagego estis desegnita kaj uzita, malgraŭ la respektindaj opinioj de aliaj geesperantistoj. Ĉar multaj nuntempaj homoj ne scias ke tiu flago rilatas al esperanto, eĉ kelkaj ne scias ke esperanto estas lingvo!; sed pli terure estas konstati ke multaj samideanoj ne konscias pri tiu evidenta fakto. Tiuj “eksteraj” homoj estis la celo de la organizintoj, pri kiu ni parolos poste.

S-ro Serrano skribis:

“Ne estis flago en la kongreso kaj ĝin anstataŭis pligrandigita bildo de koverta, kiu aludas al “Libroteko de Tokio”.

Ankaŭ la organizintoj opinias ke tiu afiŝo ne estis oportuna kaj tiam agnoskis —kaj nun reagnoskas— tion. Temis pri improvizaĵo pro sendube kritikinda malatento nia ne fari taŭgan kongresan afiŝon.

S-ro Serrano skribis:

“Kiu estis la celo de la organizantoj de la 59a Hispana Kongreso de Esperanto?”

HEF-Bulteno n-ro 347

Ĉu modernismo, propra snobismo, renovigo, rompo de tradicio?"

Preteratentante mokajn eĉ ofendajn vortojn, nekredinde skribitajn de ĝentilhomo kia S-ro Serrano, ni klarigu:

La celo de la Kongreso estis allogi ne-esperantistojn, precipe junajn, por esperanto per rekta montrado de ties utiligo. Simple montri ke esperanto ekzistas kaj funkcias ŝokas tiujn kiuj ne konas nin.

La celo de la Kongreso estis konvinki tiajn homojn ke esperanto estas viva kaj vigla afero pri kiu okupiĝas ne stranguloj sed tute normalaj personoj.

La celo de la Kongreso estis renovigi la entuziasmon inter niaj gejunuloj.

La celo de la Kongreso estis altiri la atenton de la amaskomunikiloj kaj utiligi tiujn por propagandi ĝustan kaj nuntempan bildon de nia movado.

La celo de la organizintoj estis fari apertan Kongreson funkciantan kiel montrofenestron de la avantaĝoj de nia lingvo al la neesperantista mondo.

Resume, almenaŭ ĉi tiu Kongreso havis «celojn» plenumendajn, kaj ĝuste tio —havi konkretajn celojn— malofte videblas en esperantaj aranĝoj.

Vidinte la rezultojn de la Kongreso, —eĉo en amaskomunikiloj, partopreno de gejunuloj, partopreno de “eksteraj” junaj homoj eĉ de la urbestro!— ni pensas ke la celoj plenumiĝis (tamen ne elplenumiĝis).

Por realigi tiujn celojn ni decidis oferi ĉion, eĉ la Sanktajn Simbolojn en ties kaduka formo se oportune. Ĉiu ja konsciu ke, inter neesperantistoj, nur kleraj homoj kapablas rilatigi esperanton kun tiu verda HEF-Bulteno n-ro 349

flagego. Kiel mi diris, multaj gejunuloj eĉ ne scias ke “esperanto” temas pri lingvo. Krome, tiu flago aspektigas nin, en la okuloj de normalaj homoj, kiel sektecan, framasonecan grupon tute ne aniĝindan; tio estas simpla psikologia efiko kiun ĉiu mezklera esperantisto kapablu kompreni.

Do, ni parolu ĉu tiuj celoj estas indaj aŭ ne. Ĉu vi, leganto de “Boletín”, HEF-ano samopinias? Laŭ ni, tiuj celoj, —resume la Celo, *disvastigi esperanton*—, kiu estas agnoskita en nia statuto, estas Ĉio en nia movado. Kio ne iras en tiu direkto, tio estas simpla tempoperdo aŭ ŝatokupa amuziĝo sen eĉo en nian socion. Ankaŭ nia opinio estas ke eĉ ŝajne interna afero kia Landa Kongreso estas profitinda —eĉ profitinda— ŝanco realigi la Celon, pro la kuniĝo de multaj geesperantistoj landaj kaj eksterlandaj. Ni simple agis konsekvence laŭ tiu Celo, sed ne senerare kiel ni agnoskis.

Estas iom malesperige vidi kiel oni plendas pro tiaj malgravaĵoj kaj tamen oni ne demandas pri la buĝeto de la Kongreso —ĉu ĝi estas pozitiva aŭ negativa—, pri la celoj atingitaj kaj ne atingitaj, pri la prestiĝo gajnita / perdita de nia Asocio, pri la impakto en la socion, ktp.

S-ro Serrano skribis:

“Ĉiu movado havas sian simbolon, sian identigilon. Se fremda homo estus eniranta en tiun salonon nepre li dubus demandi: kio okazas ĉi tie? Kiuj estas vi?”

Kaj, kion pensus tiu homo se li/ŝi vidintus la flagegon? Ankaŭ li/ŝi demandus: “kio okazas ĉi tie? Kiuj estas vi?” ĉar neniel verda flago kun stelo rilatas

Forpasis

La 10an de decembro, forpasis en Oviedo nia samideano Alcibiades González Meana. Li naskiĝis la 10an de januaro de 1917. Eble li ne estas tre konata de la nuntempaj esperantistoj ĉar, iamaniere, li supervivis sian generacion kaj jam forpasis tiuj, kiuj bone konis lin kaj lian aktivadon.

Komence de 1953 li, lia frato Adonis kaj aliaj samideanoj fondis en *El Entrego* (Langreo, Asturio) E-rondon nomatan: La Verda Kolombejo, kies membroj aktive partoprenis en la E-vivo de nia lando. Jam tiujare, en la 14a Hispana E-Kongreso okazinta en Bilbao, Alcibiades deklamis en programero nomata "Literatura



Vespero". Poste, en la 16a HEK (Gijón 1955), Alcibiades G. Meana rolis kiel Sekretario.

Jam de multaj jaroj ne plu ekzistas La Verda Kolombejo, sed ĝia kelkbara ekzistado ne estis sterila: plejparto el la membroj translokiĝis al Gijón, kie ili revivigis kaj plifortigis la Grupon de tiu urbo, Astura Esperanto Asocio.

Menciindas ke, en sia unua etapo, la presorgano de tiu ĉi E-Asocio, Heleco, estis organo de La Verda Kolombejo. Dum la Gijona etapo de Heleco, la revuo publikigis kelkajn kontribuaĵojn de Alcibiades, ĉefe pri art-literaturaj temoj.

Faustino Castaño

al esperanto por mezuma surstrata homo; kaj aldone li/ŝi demandus "Pri kiu sekto aŭ politika partio temas ĉio ĉi?". Eĉ tiu maloportuna afiŝo de "Libroteko Tokio" pli bone efikus ĉi rilate ĉar almenaŭ la vorto "esperanto" klare videblas en ĝi!

S-ro Serrano skribis:

"Ĉar fakte la evento estis neniu loke anoncata"

Ni duonkonsentas kun S-ro Serrano. Ja estis alia bedaŭrinda mispaŝo de la organiza skipo, nome ne meti afiŝojn anoncantajn la eventon ĉirkaŭ la kongresejo.

22—

Tamen S-ro Serrano forgesas ke la evento estis anoncita en la revuo "Plaza de la Constitución", kiu disdoniĝas inter ĉiuj najbaroj de la urbo, unu semajnon antaŭe; ankaŭ estis pluraj raportoj en la loka televido "Canal Norte", unu el tiu temis pri la Solena Malfermo. Ni daŭre povas paroli pri raporto en la kanalo "Telemadrid", pri intervjuo en la loka elsendo de RNE-1, kaj pri la 3-minuta raporto en la nacia televidkanalo "Tele 5".

S-ro Serrano skribis:

"Num en Madrido oni komencis atencion kontraŭ la Esperantan flagon"

HEF-Bulteno n-ro 349

Tio estas intenca troigo de S-ro Serrano. Neniam ni postulis ke la esperanta flago malaperu por ĉiam en venontaj kongresoj; tio estu decido de la koncernaj teamoj kiuj agu laŭstatute, gvidote de estraraj decidoj kaj kongrue kun la celoj de la tiamaj kongresoj. Tamen S-ro Serrano ja penas altrudi sian vidpunkton per tiaj flamaj vortoj.

S-ro Serrano skribis:

“Kio venos poste? Ĉu ni demetos la nomon Zamenhof, ĉar lia familia nomo havas strangan sonon al la oreloj de iuj homoj? Ĉu ni forigos la nomon Esperanto ĉar Internacia Lingvo jam sufiĉas?”

Ni bonvenigas la debaton kiun S-ro Serrano ekproponas. Homo estas inteligenta besto kaj trajto de inteligentuloj estas ne akcepti blinde la jam stabilitajn statusojn. Prefere oni debatuj kaj diskutu aferoce, argumente kaj demokratie. Ni pretas por la debato.

S-ro Serrano skribis:

“Nu, karaj amikoj, kiam oni tranĉas la radikojn de arbo, frue malfrue la arbo mortos”

Ni rigardas la aferon tiel: arbo, kiun oni ne branĉotondis ĝustatempe, malforte kaj torde kreskas. Do ni konsideras simbolaron branĉo pritondinda, ne tranĉenda, de la metafora esperanto-arbo, sed ne netuŝenda radiko, kiel S-ro Serrano

opinias. Netuŝendaĵo en Esperantujo estas la Fundamento kaj nenio pli, ĉu ne?

S-ro Serrano skribis:

“Sciu, tiuj junuloj, organizintoj de la Kongreso, ke en alia epoko ne ĉiam estis facile meti la Esperantan flagon.”

Kaj ni respektete rigardas la lukton de tiamaj esperantistoj. Sed, kiel S-ro Serrano mem diris, tio okazis en alia epoko.

Resume, ni kredas ke ni, —ke ĉiuj— rajtas esplori novajn vojojn por plenumi la Celon (diskonigi esperanton), eĉ riskante mispaŝon, tiel forpuŝante la movadon el stagnado. Se la ĝisnunaj metodoj plenumi la Celon ne plenefikas, ni ŝanĝu la metodojn.

Ĉu ĉiuj ŝanĝoj estu aprobindaj? Certe ne ĉiuj, sed, kiel Darwin komprenigis la mondon, *ŝanĝo estas la motoro de evoluado*. Se ni ne ŝanĝas nian agadon, se ni plu iras sur la jam eltretitaj vojoj, se ni ne riskas moviĝi ekster la ĉeffluon, se ni ne reagis al ŝanĝoj en nia medio, se ni ne adaptiĝas, ni estingiĝos. Tiel terure sed tiel simple.

Subskribas:

Manuel Pancorbo kaj ceteraj organizintoj
59an Hispanan Esperanto-Kongreson (Ana Manero, David Trigo kaj Jorge Camacho)

**Memoru la novan retsidejon de HEF:
www.esperanto-es.net**

PREMIO KLARA SILBERNIK, JARO 2001

S-rino, Rosalia Desirre
Rahona



Nia premiata samideano Rosalia naskiĝis antaŭ la intercivitana milito en Santa Coloma de Gramanet. Dvenante de malriĉa familio, baldaŭ ŝi devis ĉesigi siajn studojn en la lernejo. Dum la postmilito, ŝia patro estis en karcerio, pro la fakto, ke li batalis favore al la Respubliko.

Nur 12-aĝa, ŝi komencis labori en porkvendejo kaj daŭre ŝi laboris ĝis sia edziniĝo. Ŝi estas edzino de nia agema samideano, Martí Guerrero i Cots.

Ili havas tri gefilojn kaj ok genepojn. Antaŭ kelkaj jaroj ŝi lernis Esperanton en la Fervojista Klubo de Barcelono.

Kiamaniere vi taksas, ĉi tiun Premion, kies celo estas premi la edzinon de esperantisto pro ŝia helpo kaj kunlaborado kun la edzo?

Sajnas al mi, ke la ĉefa celo de la Premio "Klara Silbernik", estas rememori kaj honori la edzinon de D-ro Zamenhof. Ĉiun decembron la esperantistaro rememoras la Majstron, sed oni forgesas la grandan laboron de lia edzino, kiu daŭre helpis lin. Mi gratulas la Hispanan Esperanto-Muzeon de Sant Pau d'Ordal pro la starigo de tiu Premio, kiu daŭras jam dum multaj jaroj.

24—

Se ni analizas ĝenerale la disvolviĝon de la Esperanto-Movado, ĉu vi opinias, ke la rolo de la virino, kaj konkrete de la edzino de esperantisto, estas taŭge valorigata?

La plimulto en la Esperanto-Movado estas aferoj de viroj, sed ankaŭ ekzistas elstaraj esperantistinoj, kiel Majorie Boulton; Ada Figliera, Perla Martinelli; Carla de Lorenzi, ktp. Nuntempe oni povas vidi en Esperantaj Kursoj, tiom da virinoj kiom da viroj.

Evidente, la agado por Esperanto, ankaŭ havas sian reflektan en la ĉiutaga hejma vivo. Ĉu vi opinias, ke Esperanto influis en via kunvivado, por plej bona interkompreno?

Jes. Esperanto influis en nia kunvivado, kun la edzo, kun geamikoj, precipe en la Hispana Fervojista Klubo de Barcelono, en kunvenoj, festoj, ekskursoj, ktp.

Ĝenerale la virino nuntempe, iom post iom, okupas pli respondecajn postenojn en la ĉiutaga vivo. Ĉu tiu emancipiĝo de la virino kontribuos por ke ŝia tasko en la Esperanto-Movado estu pli

HEF-Bulteno n-ro 349

OLAFO



influa, sen atendi, kion faras aŭ decidas la edzo?

Kompreneble la emancipiĝo de la nuna virino, precipe de la nova generacio, kontribuos por ke ŝia tasko estu pli sukcesa sendepende de la edzo.

Honore al la premio, ni devas nepre rememori kaj valorigi la teniĝon de Klara Silbernrik, edzino de L.L. Zamenhof. Kiel vi imagas tiun Klaran Silbernrik?

En la biografio de D-ro Zamenhof verkita de Majorie Boulton kaj la verko de

Henk Thien, mi legis, ke Klara kaj Ludoviko multe diskutis siajn planojn antaŭ ilia geedziĝo kaj decidis elspezi grandan parton de la doto de Klara por eldoni la unuan libron pri la internacia lingvo. Tiu sinteno montras la fidon de Klara al la laboro de ŝia edzo. Post la morto de Ludoviko, Klara partoprenis En Universalaj Kongresoj de Prago (1921), Helsinki (1922), Nürnberg (1 en la sama jaro 1924).

Intervjuis: Luis Serrano Pèrez

Post la fuzio de *BBV* kaj *Grupo Argentaria* (Caja Postal) la nova banko *BBVA* asignis al la “bona konto” de *HEF* kaj al la konto de la libroservo novajn numerojn. Notu ilin, kaj kaj ne zorgu pri la pagmaniero, kiun fakte nun estas eĉ pli facila, ĉar oni povas pagi rekte en ajna oficejo de la nova banko.

HEF: 0182-2552-61-0204011.961

Libroservo: 0182-1542-74-0203118076

Projekto "LITERATURO"

Celo

altigi la prestiĝon de Esperanto

- a) ĉe la ĝenerala publiko.
- b) ĉe apartaj difinitaj kultur-sferoj.

Rimedoj:

- a) La retpaĝoj de HEF.
- b) Ĉiuj tradukitaj literaturajoj ekzistantaj, jen el Hispanio, jen el Ameriko.

Agado:

Ni proponu en niaj paĝoj esperantan version de poemo aŭ proza peco de kiel eble plej multe da hispanaj verkistoj.

En la komenco ni elektu verkistojn kun oficialaj paĝoj en la reto por eventuale starigi ligon. Tio povos malfermi nian "fenestron" al multaj "literaturemaj" homoj.

La Literatura paĝaro konsistus el tre, tre simpla, sed alloga, prezento-paĝo, sur kies dekstra flanko aperos listo de elekteblaj aŭtoroj.

La paĝo de ĉiu aŭtoro konsistus el la dekstra listo de elekteblaj verkistoj plus la spaco dediĉita al la koncerna aŭtoro, kiu konsistos el:

- a) la nomo de la verkisto.
- b) kelklinia vivprotokolo de la aŭtoro.
- c) "grafika dosiero" prezentanta poemon aŭ prozan peceton de la verkisto.

d) butono por aliri la komencan paĝon de HEF, kaj butonon por aliri ajnan "oficialan" paĝon de la aŭtoro...

Agadplano:

- a) ellabori liston de verkistoj kun "propra" paĝaro ĉe Interreto.
- b) elekti minimuman nombron de verkistoj laŭ la disponeblaj tradukoj.
- c) elekti plej konvenan literaturan pecon el ili ĉiuj.
- d) tajpi la tekstojn kaj pretigi la necesajn dosierojn.
- e) dizajni la retpaĝojn.
- f) aldoni la retpaĝojn al nia retpaĝaro.
- g) nur kiam la projekto superu la minimuman nombron de proponitaj aŭtoroj, ni klopodu ligi ĉiun apartan aŭtor-paĝon al ties "oficiala" paĝaro, petante por tio la permeson de ties mastrumanto. Tiucele ni invitu la mastrumantojn de la ligindaj retpaĝoj viziti nian paĝaron kaj eventuale starigi ligon.
- h) nur kiam la projekto superos la minimuman nombron de proponitaj aŭtoroj, diskonigi ĝin pere de anonco al novaj agentejoj ĝenerale, kaj aparte al literaturaj revuoj kaj radio- kaj televidprogramoj.

Miguel Gutiérrez

HEF-Bulteno n-ro 349

Nova frukto el E-historia branĉo

Un siglo de esperanto en Aragón
(Unu jarcento de esperanto en Aragono)
Eldonis: Esperanta Societo "Frateco".
Jaro 2000. 197 paĝoj.

Cent jaroj da viva historio ne estas tro por iu ajn lingvo, sufiĉe por iu ajn movado kaj multege por iu ajn homo. Esperanto estas iel juna lingvo sed ankaŭ jam spertoriĉa dum siaj pli ol cent jaroj da juneco (rilate al la homoj aŭ atingoj) kaj soleco (pensante pri ombroj aŭ mankoj). Tamen, ne abundas libroj rigardantaj la intensan historion de Esperanto kaj de la homoj kiuj vivi(gi)is ĝin. Pro tio estas agrabla novaĵo la apero de libro esploranta tian temon. Kompreneble, libroj ne naskiĝas per spontanea generado. Ankaŭ ĉi tie ni devas fosi nian sulkon.

Feliĉe, inter ni estas Antonio Marco Botella, verkema aktivulo, unu el kiuj dediĉis tempon kaj entuziasmon por labori traserĉante en la grundon de la historio la spurojn de Esperanto. Danke al li, ni havas la ĉefajn librojn pri esperanta historiografio en nia lando. Nepre menciinda estas unue la verko "*Analoj de Esperanto en Hispanujo*" (1987) je du volumoj. Pri la rilato inter Esperanto kaj la laborista movado li verkis "*Laboristaj-n*

kronikoj-n" (1996). Antaŭe, okaze de la jubileo (75-jara datreveno) de "Frateco", la ĉefa esperantista asocio en Aragono, estis prezentita "*Kroniko* el la historio de «Frateco» (1983). En ĉi tiuj libroj oni parolis pri Esperanto en Esperanto.

Nun alvenas al ni "*Un siglo de esperanto en Aragón*" (Unu jarcento de Esperanto en Aragono) kie Antonio



Marco prezentas la centjaran bildon de la esperantistoj en Aragono, ĉi-kaze en hispana lingvo. Tiu fakto permesos, ke ne-esperantista publiko povu alproksimiĝi kaj kontakti kun tiu speciala parto de la socia kaj historia kulturo en Aragono (Iusence, ankaŭ Esperanto estas ero aŭ ono de Aragono). Ni rimarku, ke la intereso pri tiu ĉi libro estas pli grava se ni konsideras, ke la esperantistoj en Aragono grave rolis multfoje en la esperantista movado. La libro, ne tro ampleksa (197 paĝoj), legeblas facile kaj parolas ne nur per klaraj vortoj, sed ankaŭ per bildoj (ĉar ĝi enhavas sufiĉe da fotoj kaj ilustraĵoj). Verki (kaj legi) ĉi tiun libron, krome reprezentas omaĝon al tiuj multnombraj esperantistoj kiuj dum tiom da jaroj ebligis tiun homaman kaj kulturan entreprenon (vorto de la aŭtoro en la antaŭparolo "*Kroniko ...*").

Ni ne povas forgesi nian historion kaj ni devas zorgi pri ties memoro ĉar, speciale en Esperanto, "memoro" estas "oro" de (nia) "memo".

Lorenzo Noguero

Franz Kafka



Kafka, Franz: “Songô [kaj aliaj rakontoj]”. Trad. Wilhelm Luttermann. Dobrichovice: Kava-Pech 1996. 104 p.

Kafka, Franz: “La metamorfozo”. Trad. Mauro Nervi. Pisa: Edistudio 1996. 78 p. (Serio Oriento-Okcidento n-ro 31). Kafka, Franz: “La metamorfozo”. Trad. Reinhard Haupenthal. Chapeçó: Fonto 2000. 60 p.

Insektiĝo 3

En 1996 eldoniĝis du esperantigoj de “Die Verwandlung”, la plej fama novelo de Franz Kafka (1883-1924), pri la subita insektiĝo de homo. Unu el ili, “La transformiĝo” (laŭvorta traduko de la titolo), aperas en la kolekto “Songô” kune kun 16 rakontoj samaŭtoraj (ekzemple, “Ŝakaloj kaj arabo”). La alia debutas sola, kaj alititole: “La metamorfozo”. Faris la unuan Vilhelmo Lutermano, germano; la duan, Mauro Nervi, itala doktoro pri germana literaturo. Mia recenzo pri ili (“La insektiĝo”) publikiĝis siatempe en revuo “Esperanto” (majo 1997, p. 93).

Reinhard Haupenthal, ne kontenta pri ambaŭ redonoj de la novelo, entreprenis propran esperantigon. Tamen, malgraŭ lia nediskutebla kompetento lingva kaj stila, ĉi tria versio prezentas diversajn problemojn el la legpunkto de esperantulo simple deziranta konatiĝi kun la verko. Unue, ne eblas ne rekomendi la probable plej gravan novelon verkitan pasintjarcente (duope kun “La fremdulo”, de Albert Camus) fare de aŭtoro, kies influo atingis la verkarojn de i.a. Jorge Luis Borges, Dino Buzzati, Julio

Cortázar, Karel Čapek, Danilo Kiš, István Árkény kaj José Saramago (li mem diras tion publike). Kontraste, Hauptenthal, en la antaŭparolo, skribas: “Kafka apartenas ne nur al miaj plej neŝatataj aŭtoroj, sed mi rekte abomenas lin.” Interesa aserto el la buŝo de tradukinto! Sed nia tradukulo altruisme kaj modeste pluas: “[...] okazis la ironio de la sorto: mi restarigis la honoron de Kafka, donis al li adekvatan veston Esperantan kaj sam-tempe ĵuris de nun lasi lin ubliete.”

Ĉu li efektive donis al la novelo adekvatan veston esperantan? Mi dubas.

Unue mi anoncu, ke mi neniel kaj nenial kontraŭas t.n. neologismojn. Kiel mi jam pruvis per kontribua artikolo al la libro “Lingva arto” (“La mava lingvo”), la nuna esperanto, ne nur la beletra, simple ne imageblas sen la “neologismoj” kompilitaj en “Parnasa Gvidlibro” en 1932, kaj la samo dirindas pri multaj postaj. Tamen, kaj malgraŭ mia espero iama, abundas kaj superabundus en ĉi tria versio la profetitaj piĉismoj, t.e. neologismoj ne nur radikaj, sed ĉefe partikulaj kaj afiksaj, kun apenaŭaj aŭ plej ofte neniomaj klarigoj: sufikso “-al-”, “men” (t.e. “malpli”, sed li uzas ankaŭ “malpli”), “ĝus” (t.e. “ĝuste tiam”), “friŝtiko” (t.e. “matenmanĝo”; la kunmeton “maten-manĝ-” li uzas plurloke en la traduko, eĉ samlinie kun la ĵus menciita piĉismo), prefikso “des-” (“despacienci”, “desvesti”), “mido” (t.e. “tagmezo”: “postmida”, “premido”, “ĝismide”), prefikso “om-” (“refoje, sed alimaniere”: “omaranĝo”), “hinher[n]ado” (t.e. “tien-kaj-reen-iro”), prefikso “pre-” en HEF-Bulteno n-ro 349

tempa kaj spaca sencoj (“prekuri”, “previdi”, “prefenestra”), prepozicio “dos” (t.e. “de sur”: “dosflugi”; ĝi kolizias kun la neologismo “doso” signifanta “ladskatolo, ladboto”), “olim” (t.e. “iam istempe”; “olimaj”), sufikso “-ed-” (t.e. “kvanto, pleno”: “buŝedo”).

Oni aldonu al tio lavangon da ligostrekoj, kiel en legaĵo por komencintoj: “maten-manĝi”, “ver-ŝajne”, “bon-volos”, “sam-tempa” kaj eĉ “mal-havebla”!, aŭ la frazo “Sinjoro Samsa, grand-okule, plur-foje kap-aprobis”, kie mi nepre forigus la duan strekon (neniu el ambaŭ radikoj kuntuŝiĝas vokale). Aŭ ĉu fin’fin’e oni ek’uz’u anstataŭ lig’o’strek’o’j divid’a’j’n apostrof’o’j’n??

Entute, kaj ne menciante aliajn el la stilmanioj de Hauptenthal, pri kies esperanto do temas? Jam de la unua linio la stilo sentiĝas obscene haŭpentala, kvankam fine ĝi sonas flua kaj klara, post plurpaĝa kutimiĝo. Ne povante kompari kun la lingvo de Kafko mem, mi facile flaras, ke ĉi esperantigo odoras iom tro piĉe, t.e. laŭ la stilo de Karolo Piĉ. Bona traduko devas legiĝi kiel bona originalo, kaj ĝuste tion sukcesis Hauptenthal: bonan originalon... de la praga skolo.

Germanlingvaj tradukemuloj havigu al si la tri provojn. Ili tralegu, komparu kaj, se ne kontentaj, entreprenu mem propran. Ĵus eldoniĝis la romanego “La lada tambureto”, de Günter Grass, en traduko de Tomasz Chmielik. Mi scivolas, ĉu aperos tiom da versioj de ĝiaj nunaj 533 paĝoj!

Jorge Camacho



Lingva Angulo 14

de Antonio Valén

PARONIMOJ

La vorton **paronimo** PIV (*Plena Ilustrita Vortaro*) difinas jene: “Vorto preskaŭ samsona kun alia, sed sence malsama (ekz. pesi-pezi): *en esperanto la paronimoj estas principe evitindaj, krom se iliaj sencoj estas tre malsamaj*”.

Spite la rekomendon de nia kara vortarego, ne malofte “paronimito” inside atakas la langojn de niaj samideanoj — eĉ de lertaj parolantoj —, kiuj facile stumblas ĉe vortoj forme similaj. Kompreneble, ankaŭ en la naciaj lingvoj estas paronimoj (ekz. hispane *constricción-construcción, esotérico-exotérico, hambre-hombre*), kaj felice esperanto montriĝas malpli paronimema ol la ceteraj lingvoj. Tamen ni devas aparte zorgi pri kelkaj recidivaj kaj ŝiboletaj paronimoj buŝe de hispanlingvanoj. Jen kelkaj ekzemploj:

pesi estas “mezuri la pezon de objekto, komparante tiun pezon kun alia pezo, elektita kiel unuo”: *pesi leteron, pesar una carta*. Figure oni diras: *pesi ĉiu sian* 30—

vorton, sopesar cada una de sus palabras; pesi la meritojn de du rivaloj, sopesar los méritos de dos rivales. La signifo de *pesilo* estas do *báscula: banĉambra pesilo, báscula de baño; pesil-taso, platillo de balanza*. Kontraste, **pezi** signifas “fari, pro la altiro de la tero, konstantan premon sur subtenantan objekton aŭ konstantan tiron sur pendigantan objekton”: *li pezas okdek kilogramojn, pesa ochenta kilos*. Figure: *tiu argumento multe pezis sur mia decido, ese argumento pesó mucho en mi decisión*.

diskuti signifas laŭ la PIV-suplemento “interparolante kun malsamopiniantoj, interŝanĝi argumentojn pri unu temo”: *diskuti pri politiko, discutir de política*, kaj ankaŭ “ekzameni per debato, esplorante la diversajn flankojn de demando”: *diskuti la buĝeton de la asocio, discutir el presupuesto de la asociación*. Sialflanke, **disputi** estas “malpaci, akre diskutante”: *disputi kun iu, tener una disputa con alguien*. Fakte **diskuti** = *discutir, (deliberar, debatir)* kaj **disputi** = *disputar, (tener una disputa)* en norma hispana, sed popol-hispane *discutir*

HEF-Bulteno n-ro 349

ofte signifas (ek)disputi, (ek)konflikti, (ek)kvereli: *sus padres discutieron por una tontería, liaj gepatroj ekdisputis pro bagatelo.*

fonto estas “loko, kie akvo aŭ alia likvaĵo eliĝas el la tero” t.e. *fuelle* aŭ *manantial*: *kristal-klara fonto, fuente cristalina*. Ankaŭ figure: *fonto de inspiro, fuente de inspiración; fontoj de enspezoj, fuentes de ingresos*. Tamen la hispanan *fuelle* redonas **fontano** kiam ĝi signifas “konstruo kun speciala tub-aranĝo por ŝpruci la akvon”: *monumenta fontano, fuente monumental*.

kompromiso signifas “interkonsento, aranĝita dank’ al reciprokaj cedejoj de du kontraŭuloj pri la diskutitaĵo”: *ni venis al kompromiso (= ni kompromisis), llegamos a un compromiso*. Kontraste, **kompromiti** estas “meti en danĝeron ies reputacion, honoron”: *liaj leteroj kompromitis la virinon, sus cartas comprometian a la mujer*.

Cetere, mi volas rekomendi libreton de Marinko Ĝivoje *Esperantonimoj* (Pisa, Edistudio, 1979, 119 p.), kiu temas ne nur pri paronimoj, sed ankaŭ pri antonimoj, sinonimoj, homonimoj kaj vortludoj. Ĝi estas valora helpilo por komencantoj kaj progresintoj.

Libroservo de HEF

Apartado 119

ES-47080 Valladolid

Tel: 983-26-00-86

Rete: pgarrote@eurociber.es

60 Hispana Kongreso

Loĝado

San Javier
Santiago de la Ribera
(Manga del mar menor)

La organizantoj de la kongreso ne faros rezervojn por loĝado. Tamen oni sendos al aliĝintoj, kaj eventualaj pentintoj, liston de hoteloj kun telefonnumero, proksimuma prezo, kaj ĉiuj proponitaj servoj. La hoteloj disponas la liston de kongresanoj, por aplikado de favora tarifo. Nun, por orientado, jen kelkaj nomoj de loĝejoj kun proksimuma prezo (P.):

Hoteloj

Albohera (***) Marin 29, S. Ribera.
Tel. 968335914. (P: 7.500 -- 10.000).

Lido (***) Conde Campillo 1, S. Ribera.
Tel. 968570 00. (P: 5.000 -- 7.500).

Hotel Madrid (*) Zarandona 18, S. Ribera. Tel. 968570504. (P: sub 5.000).

Pensión Manida (***) Muñoz 11, S. Ribera. Tel. 968570011. (P: sub 5.000).

Pensión Nenico (***) Principe 8, S. Javier. Tel. 968572901. (P: sub 5.000).

Apartamentoj

AT Pagán (***) Maestre 4, S. Ribera.
Tel. 968570032. (P: 5.000 -- 7.500).

Kampadejoj

Camping La Encina, Ctra. La Ribera--Los Alcázares, tel. 968570133.
(P: 2.000 -- 4.000)

Post la 30 de junio, la organizantoj NE garantias loĝadon, tiuepoke ĉar la regiono plenas de turistoj. Faru vian rezervon kiel eble plej frue!



60a Hispana Esperanto-Kongreso

San Javier (Murcia),
22a ĝis 30a de junio 2001
Kongresejo:
Centro Cívico de San Javier
Parque Almansa

ALIĜILO N-RO.....

(BONVOLU SKRIBI TAJPE AŬ PRESLITERE)

Familiaj nomoj
Antaŭnomo:
Naskiĝdato (2) HEF-numero
Adreso
..... Poŝtkodo
Urbo Telefono
Retadreso Faksilo
(2) Nur por statistiko

Kongreskotizoj en pesetoj: ĝis la 30a de Aprilo poste
Kongresano 5.000 5.500
Donacon
ENTUTE:

Kotizu pere de BBVA, konto-numero: 0104-0028-86-0300159774; al la 60a Hispana
Esperanto-Kongreso; ES-30730 San Javier (Murcia).

Kunsendu la pagpruvilon kaj la aliĝilon al la suba adreso.

Por bankĉekoj kaj poŝtmandatoj aldonu 10%

LA KOTIZO ESTAS NE REPAGEBLA.

Dato kaj subskribo

Kongresa Sekretario: Vicente Sanchez Lumberas; Saturno 15; ES-30730
San Javier (Murcia); Tel. 968192598; 968191243; 968183338; 968190588
Retadreso: vsa10001@almez.pntic.mec.es

Junaj lernantoj

En mondo tre riĉa je ofertoj, la esperantistoj devas trovi allogajn rimedojn por altiri la atenton de la junuloj kiuj transprenos la torĉon de la E-aj lingvo kaj kulturo. Malfacila tasko, tamen plenumbla kiel montras la apudaj fotoj .

Asocioj (Barcelona E-Centro), liceoj (Don Benito, Badajoz) kaj Universitatoj (KAE — Aŭtonoma Universitato de Barcelono), devas daŭre komplementi la naskiĝantan agadon en Interreto.

